


KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO DE KATALUNA ESPERANTO-ASOCIO

NUMERO 293 (60) - KVINA EPOKO

JULIO 1995



**ASSOCIACIÓ
CATALANA
D'ESPERANTO**  **KATALUNA
ESPERANTO-
ASOCIO**

Registrita ĉe "Generalitat de Catalunya" en la unua sekcio per n-ro 5785)

Apartat/Poŝtkesto 290 - 08200 Sabadell - Catalunya/Katalunio.
Tel. (93)716.36.33, (93)710.96.36 (ekde lundo ĝis vendredo inter la 16a kaj 19a h.). Kolektiva membro de Kooperativo de Literatura Foiro. Kun laborinterkonsento kun la Akademio Internacia de la Sciencoj San Marino.

KOTIZOJ POR LA JARO 1995: Individua Abonanta Membro 3.200 p-toj; Individua Subtenanta Membro 6.400 p-toj; Individua Dumviva Membro 64.000 p-toj; Kolektiva Membro 6.400 p-toj. Juna Membro 2.500 p-toj.

BANKO: Caixa de Pensions - agència 461 - Sabadell - konto: 550-53.

PLENUMKOMITATO DE KEA: Prezidanto: Josep Fraquesa; Viceprezidanto: Lluís Armadans; Ĝenerala Sekretario: Llibert Puig; Vicsekretario: Hektor Alos; Kasisto: Oscar Puig; Komitatanoj: Miguel Ángel Altuna, Felip Artero, Paco Belmonte, Bartomeu Costa, Girona Espero, Francesc Ibáñez, Joan Marimon.

KONTROLA KOMISIONO: Tomàs Alberich, Ricard Jordana.

KATALUNA ESPERANTISTO: Hektor Alos, Ferriòl Macip. Katalunlingva korektado: Eva Sunyer i Planes.

La artikoloj publikigitaj en *Kataluna Esperantisto* ne nepre esprimas la starpunkton de KEA, se ili ne estas subskribitaj ĝianome.

KATALUNA ESPERANTO-JUNULARO: Apartat 32 318, 08080 Barcelona.

FREQUËNCIES: Apartat 1 163, 08300 Mataró (Maresme).

Dipòsit Legal: B-27362 - 1982. Presita ĉe Ràpid Graf. (93)725.50.91. Sabadell.

Nia revuo elkore dankas la aŭtoron de la ĉi suba plendo kaj promesas fari ĉion eblan por pli regule aperadi.

Rondela plendo

De Kataluna Esperantist'
ĝian malfruon mi ne ŝatas
Mia edzino min kompatas:
sen la revuo, mi iĝas kist'.

Sendube mi estas hedonist'
sed la kvaliton mi konstatas
de Kataluna Esperantist'.
Ĝian malfruon mi ne ŝatas.

Mi diras sencere per insist':
miaj vortoj ne plu debatas,
kaj la revuon laŭreatas,
ĉar mi ne estas antagonist'

de Kataluna Esperantist'.

Albert Torné


En ĉi tiu numero, vi povos legi pri diversaj aktivaj okazintaj en nia lando. La redaktoroj estas la unuaj mirigitaj pri tio, ke ĉiunumere eblas listigi dum pluraj paĝoj imponan nombron da okazaĵoj en la rubriko *Nia agado*. Ni kun ĝojo publikigas ankaŭ diversajn aranĝojn organizitajn de niaj aktivaj najbaroj tuluzaj kaj vi povos legi pri partopreno de katalunoj en la kongreso de Langvedoko-Rusiljono. Jam plurajn jarojn la rilatoj kun niaj nordaj najbaroj montriĝis riĉaj kaj fruktodonaj: diversaj spertoj aperantaj sur niaj paĝoj ja estas importeblaj al nia lando, kaj espereble tion notos niaj aktivuloj.

Aliflanke, ni ŝatus atentigi vin pri la strategia artikolo de László Szilvási. Temas ja ĉefe pri la vidpunkto de profesio de esperanto, redaktoro de grava internacia esperanto-gazeto, sed la konstato pri ŝajna altigo de la prezoj de libroj, muzik-registraĵoj kaj aranĝoj en Esperantio koncernas ĉiujn. Sendube la katalunaj aktivuloj devus sekvi la ekzemplon de siaj hungaraj kolegoj kaj serioze okupiĝi pri long-daŭra strategio, fiksi mejloŝtonojn atingindajn en difinita tempo kaj plani la necesajn rimedojn por efektiviĝi la celojn.

Serioza planado kaj internacia kunlaboro certe estas rimedoj por la kresko de niaj fortoj.

KEA demarŝas pri la projekto Linguapax

Kiel informas la revuo *Esperanto* (majo 1995), la ĝenerala sekretario de UEA, Mark Fettes, preparolis en Parizo kun la estro de la eduka sektoro de Unesko, Collin Power, la kunlaboron de UEA en la Unesko-programo *Linguapax*, pri la rolo de fremdlingva instruado en edukado por paco kaj toleremo. Montriĝis, ke la prezidanto de la monda kunordiga komitato de tiu ĉi projekto estas Fèlix Martí, prezidanto de la kataluna Centro Unesko. Tial UEA komisiis al nia asocio pluan esploron pri la afero.



En interparolo de nia ĝenerala sekretario, Llibert Puig, kaj Fèlix Martí, KEA informis pri la intereso de UEA pri la projekto. Martí promesis, ke li informos la Internacian Konferencon pri la Pro-

jekto Linguapax, okazontan inter la 30a de junio kaj la 2a de julio en Melbourne (Aŭstralio), pri la intereso de UEA kunlabori en la projekto.

Nia asocio, kun delongaj fortaj rilatoj kun Fèlix Martí kaj la kataluna Centro Unesko, esperas sukcese lobii, por ke UEA povu partopreni tiun projekton.

Librotago

Denove ĉi-jare Centro de Esperanto Sabadell partoprenis en la loka libro-foiro okaze de la tradicia libro-tago en Katalunio, la 23an de aprilo. En tre bele aranĝita budo disponigita de la loka ŝparkaso Caixa de Sabadell, ni prezentis librojn kaj muzikajn varojn: kasedojn, diskojn kaj kompaktdiskojn, inter ili la ĵus eldonitan *Vinilkosmo-Kompil' 1*. La bu-

Enhavoriĉa kataluna kongreso

Kiel ni avertis en nia pasinta numero, la 27a Kataluna Kongreso de Esperanto, okazonta de la 12a ĝis la 15a de oktobro, enhavos interesan kaj novstilan programon. Matene, la aranĝoj okazos en esperanto, dum vespere ili estos nacilingvaj.

Inter la konfirmitaj esperantaj gastoj, aldone al la jam anoncita Gerrit Berveling, redaktoro de la literatura revuo *Fonto*, elstaras la Madrida poeto Miguel Fernández, kiu deklame kaj kante prezentos *Havenoj*, la novan, ankoraŭ eldonotan, poemaron de Mauro Nervi. Jak Le Puil, krom prezenti sian "ajnisman" revuon *La Kancerkliniko*, ankaŭ kantos. La fama Fraŭlino Barlastone certe pasigos al ni amuzan vesperon per siaj kabaredaĵoj. En la tria vespero ni ĝoje gastigos la altiran pac-koruson Primavera per la Pau, kiu jam partoprenis nian kongreson en Lleida antaŭ naŭ jaroj. La LKK ŝatus ankoraŭ riĉigi la programon per afrikdevenaj kantistoj, kvankam la koruso jam enkondukis afrikajn muzikilojn kaj kantojn en sian repertuaron.

Ĝuste el la nunaj kontaktoj kun afrikanaj grupoj el Mataró dependas parto de la vespera programo de la kongreso, ligita al la kongres-temo: *"De kompreniĝo al toleremo, de kultura diverseco al intermiksado"*. Samtempe ni kontaktas diversajn etnismajn kaj religiajn asociojn por okazigi forumon malfermitan al la publiko. Tamen ĝis la nuna momento ni povas certigi nur pri la dua aspekto de nia kongreso, nome la festadon de la 100-jariĝo de kino. Jam ekzistas firma interkonsento kun la Kataluna Nacia Filmoteko kaj lokaj kinemuloj por okazigi priesperantan kin-ciklon. Tiukadre ni celas prezenti ĉiujn katalunajn filmojn rilatjn al esperanto. La filmoteko afable akceptis pruntedoni ĉiujn filmojn, kiujn ni petos, kaj eĉ demarŝi ĉe la hispana samcela organizo por tiuj, kiujn ĝi ne posedas.

Ĉi numeron de *Kataluna Esperantisto* akompanas la aliĝilo. Ni esperas, ke vi ne maltrafos tiun ja interesan eventon.

"Toleremo signifas respekton al diverseco per agnosko de nia komuna homaro" deklaris la ĝenerala sekretario de Unuiĝintaj Nacioj, Butros Butros-Ghali. Tio okazis dum gazetara konferenco la 21an de februaro en Nov-Jorko, kiun li tenis kune kun la ĝenerala direktoro de Unesko okaze de la oficala komenco de la Jaro de Unuiĝintaj Nacioj por Toleremo. Federico Mayor siaflanke, asertis, ke *"instruado de toleremo estas la plej bona investo, kiun ni povas fari por nia estonta sekureco. Obeeman junularon ni ne deziras. Ni deziras plilarĝigi la debaton kaj ankaŭ la konteston. Sed ni malakceptas perforton"*.

don, malfermitan dum la tuta tago, vizitis almenaŭ 50 homoj, kiuj ricevis informilon, kaj pluraj centoj da preterpasantoj informiĝis pri la ekzisto de esperanto.

ces

Disko-prezento en Girona


La rokgrupo Pixamandúrries el la vilaĝo Corçà (Baix Empordà) prezentis la diskon *Vinilkosmo Kompil'*. Temas pri la nuraj katalunoj el la aroj aperantaj en ĉi-lasta eldonaĵo de Partisano, la diskojo el Tuluzo ligita al la revuo *Rokgazet'*. La prezento okazis la pasintan 2an de junio en junulara kunveno en Salt (Gironès). Pixamandúrries prezentis, krom siaj memstaraj diskoj, ankaŭ esperantan rokmuzikon.

Ekskurse

Centro de Esperanto Sabadell organizis ekskurson la 18an de februaro al la Taragona regiono por gustumi la tiean tradician pladon.

Josep Alberich i Jofrè (1904-1995) eks-sekretario de Kataluna Esperantista Federacio

Josep Alberich i Jofrè forpasis la 9an de aprilo en Barcelono. Li estis la kvara el la ses fratoj-esperantistoj Alberich. 14-jara li lernis la internacian lingvon en la societo Paco kaj Amo, kie ĉiudimanĉe kunvenis mirinda grupo (Dalmau, Gumà, liaj fratoj Sebastià kaj Tomàs k.a.). Antaŭ la militaj jaroj, li aktivis kiel esperanto-instruisto kaj estis elektita sekretario de Kataluna Esperantista Federacio. Post la milito, li kunfondis la societeton Stelo de Paco, kune kun Pujulà i Vallès, Fernández Jurado kaj Petro Nuez. Nia asocio perdis unu el siaj plej elstaraj pioniroj.



calçots (rostita freŝa cepo kun saŭco el tomatoj, migdaloj, oleo, vinagro k.a.). Laŭ interkonsento kun la tieaj esperantistoj, oni vizitis la surlokajn vidindaĵojn kaj poste ĉiuj kune tagmanĝis en la urbo Valls. Entute partoprenis 20 homoj.

Simila nombro partoprenis alian ekskurson de la sama societo la 17an de junio al la vilaĝo Peralada kaj Costa Brava.

Esperanta Fako "Miquel Vilagrà" organizis viziton al la Esperanto-Biblioteko Ramon Molera Pedrals en Moià.


ces/efmv

Akademiano en Barcelono

La 25an de februaro, la brazila akademiano Sylla Chaves prelegis en Klubo de Amikoj de Unesko pri siaj verkoj antaŭ pli ol 20 esperantistoj.

efmv/ke

Prezento de metodiko



Esperanta Fako "Miquel Vilagrà" en Klubo de Amikoj de Unesko de Barcelono kaj KEA organizis la prezenton en nia lando de fama esperanto-metodo: Baza Esperanto-Kurso. Ĝia aŭtoro, Denis Keefe, profesia lingvo-instruisto, prelegis fine de aprilo pri ĝi en Barcelono, Sabadell kaj Reus.

efmv/ces

KEA en Lunel

Entute 12 gemembroj de nia asocio partoprenis inter la 13a kaj 14a de majo la ĉi-jaran kongreson de la Esperanto-Federacio de Langvedoko-Rusiljono en la urbo Lunel (Okcitanio). Nia ĝenerala sekretario Llibert Puig prelegis pri organizaj problemoj kaj eventuala kunlaborado inter proksimaj mediteranea asocioj.

Inter la diversaj programeroj elstaris la prelego de la ukraina esperantisto d-ro Jaroslav Matviĵiŝyn, matematikisto kaj historiisto de sciencoj kaj filozofio, kiu esploras kaj prelegas tra Eŭropo en universitataj rondoj; la priskribo de ges-roj Paing pri ilia plurmonata vojaĝo tra Azio; la prezento de la unua parto de la nova vidbenda esperanto-kurso "Mazi en Gondolando".



Niaj najbaraj samideanoj promesis partopreni nian venontan kongreson en Mataró. Ni plej simpatie bonvenigos ilin.

llpg

Dudirekta votareto

Pro iniciato de aktivuloj el Sabadell, inter ili komputisto, oni pretigas dudirektan vortareton esperanta-katalunan kaj kataluna-esperantan. La bazo estas la klasika esperanta-kataluna vortaro de Grau Casas entenanta 3 600 kapvortojn, kiun oni inversigis kaj bele prezentis.

ces

Artikolo por kultura diverseco

La prestiĝa kultura revuo en esperanto *Literatura Foiro* publikigis en sia aprila numero 13-paĝan artikolon de Hektor Alos i Font pri morto de lingvoj. La aŭtoro prelegis ĉi-teme dum la Internacia Junulara Kongreso en Vraca (1993) kaj la pasinta KEJ-Diskut-

kunveno (1994). Li prezentas komence kiel ekzemplojn plurajn procesojn de lingvo-dekadenco, poste malvualas klasikajn metodojn de la ŝtat-nacioj por unuecigi siajn popolojn kaj fine akre atakas tiujn lingvistojn semantajn lingvajn antaŭjuĝojn, kiujn li konsideras modernaj ideologoj de unuetnaj ŝtatoj. La artikolon garnas tri fotoj el Norda Katalunio de perfortaj metodoj por subpremi la lokan lingvon katalunan.

Servante en Slovenio

Felip Artero, redaktoro de *Kata Luno*, civilservas ekde junio en Slovenio. Li helpas en kampaĵo por bosniaj rifuĝintoj prizorgita de la Barcelona Aŭtonoma Universitato. Antaŭvidatas, ke li organizos esperanto-kurson dum sia restado.

Samnomanoj

En la esperanto-movado ekzistas aliaj KEA-j: kanada, korea, kuba. Nia asocio deziras stari kunlaborajn rilatojn kun ĉiuj. Ni sukcesis jam kun la kanada kaj ĵus kun la korea asocioj, unue per interŝanĝo de revuoj kaj korespondpetoj. En la lasta ricevita bulteno de Korea Esperanto-Asocio, *La lanterno azia*, ni informiĝas, ke koreoj okazigos kiel ni sian ĉi-jaran kongreson en la venonta oktobro kaj ankaŭ ĝi estos la 27a, same kiel la nia.

Eldono de la KEA-Statuto

Nia asocio pretigis belaspektan eldonon de la statuto de KEA enhavantan la modifojn enkondukitajn en la asembleo de 1987. Interesitaj membroj petu senpagan ekzempleron al nia oficejo.

Alvoko al kunlaboro

Reinhard Haupenthal, redaktoro de la literatura revuo *Ilitis-forumo*, elstara tradukisto kaj volapukologo, interesiĝas pri korespondintoj de la grava verkisto Raymond Schwartz. Oni scias, ke Schwartz (ankaŭ nomita Rajmondo Nigra) korespondis kun kelkaj katalunaj esperantistoj, plurfoje estis en Barcelono kaj publikigis siajn unuajn poemojn en *Tutmonda Espero*. Tio okazis antaŭ kaj dum la unua mondmilito.

Konantoj de tiuj rilatoj bonvolu kontakti s-ron Manuel de Seabra (Bailèn, 56, 3r 4a, 08009 Barcelona).

Deziras korespondi...

- (2)
Pedro Pablo Ramírez
Apartado Aéreo 3487
Cartagena
Kolombio
30-jarulo, kiu interesiĝas pri vojaĝado, muziko, legado kaj futbalo.
- (3)
Victor Sirvent
Apartado Postal 20495
Caracas 1020
Venezuelo
31-jara matematikisto deziranta korespondi kun esperantistoj el Katalunio pri lingvoj, lingvistiko, literaturo, sciencfikcio, historio kaj filatelo.
- (4)
Nijnevartovska Esperanto-Klubo
Ul. 60 Let Oktjabrja, 6-135
RUS-626440 Nijnevartovsk-6
Siberio, Rusio
Pluraj junulinoj (Eljvira, Alina, Ira, Olga, Julia Oksana, Tanja) deziras korespondi kun katalunaj junuloj pri muziko, sporto, vojaĝoj ktp.
- (5)
Shin Suhyon
Kaebong 3 dong 360-6, Kurogu
Seoul 152-093
Korea Respubliko
29-jara fraŭlino, muzikistino, ŝatas lerni fremdajn lingvojn.
- (6)
Kiam Raeyong
Olympic Apt. 325-2001, Orundong Songpagu
Seoul 138-151
Korea Respubliko
16-jara lernantino.
- (7)
Han Sudok
Changchondong 62-22, Sodaemungu
Seoul 120-180
Korea Respubliko
14-jara lernanto.
- (8)
Ven O. Gong
Kwang-Hwa Mun. P. O. Kesto 1480
Seoul 110-614
Korea Respubliko
38-jara akupunkturisto deziras korespondi kun nialandaj esperantistoj, kiuj interesiĝas pri akupunkturo kaj naturkuracado.

Rimarkoj

- la liston ni aktualigos, kiam alvenos novaj petoj; plenumitajn petojn ni forigas el la listo, sed ni konservas la sinsekvan numeradon
- kiam membro de nia Asocio respondos kiun ajn peton, bonvolu informi nian sekretariejon por forigi la petanton el la listo
- se membro de nia Asocio ricevas korespond-peton kaj li/ŝi ne povas ĝin akcepti, bonvolu sendi ĝin al ni, por ke aliaj membroj havu la okazon korespondi

KULTURA ESPERANTO-DOM,O

Kastelo Gresillon (Bauge, Francio)

Trinivelaj kursoj de la 6a-19a de aŭgusto kaj 19a - 31a de aŭgusto.

4a MEDITERANEA KONFERENCO DE ESPERANTOLOGIO

“La esperanta leksikografio: problemoj terminologiaj kaj frazeologiaj”

Triesto (Italio) 28a - 31a de oktobro.

3a INTERNACIA KULTURA KAJ TURISMA ESPERANTO-SEMAJNO

Tuluzo plu agadas: niaj okcitanaj najbaroj denove mirigis nin per sia agado. Jen tri el ili en la sekvaj paĝoj.

Eŭropa Tago

La 9an de majo oni festas la datrevenon de la Deklaracio de Robert Schumann, Patro de Eŭropo.

revuoj, KDoj kaj kasedoj, kaj du modestaj paneloj prezentantaj nian solvon al la eŭrop-unia dilemo: lingv-egaleco kontraŭ komunik-efikeco.

La bud-prezento okazis en la interna korto de la urbodomo, kie, eĉ dum semajntago, vagas sufiĉe multaj promenantoj. De la 10a matene ĝis la 18a, neniam ĉesis la homfluo, kaj ni starigis interesajn kontaktojn kaj diskutojn.

Dum vespera spektaklo sur la ĉefplaco antaŭ la urbodomo, oni povis aŭdi la "Eŭropan Himnon" korusse kantitan, kaj amkantojn el Bosnio; sed ankaŭ vigle aplaŭdita estis nia fama Jean-Marc Leclercq (Jomo), kantisto el la grupo Rozmariaj Beboj, kiu mallonge prezentis la lingvon esperanto, kaj sola kun gitaro kantis *Jen nia mondo* kaj la italan partizanan kanton *Ho bela, ciao* en esperanta traduko.

Nia flegado de bonaj rilatoj kun la Eŭropa Domo celas kompreneble asociiĝi al tiu ĉi institucio por pli gravaj projektoj.

E.K.C

La Prima de las lengas

La Printempo de Lingvoj en Tolosa estas jam longdaŭra tradicio, kiu de tri jaroj trovis sian nunan formon: ampleksa lingv-eks-

pozicio en popola kvartalo kune kun festaj manifestacioj celantaj konigi kaj defendi la lingvojn de la mondo.

Membro-fondinto de la manifestacio, Esperanto-Kultur-Centro kontribuis per ekspozici-budo kaj publika preleg-debato, dimanĉon la 21an de majo. Ĉi-jare la ejo - la ĉefplaco antaŭ la urbodomo - kaj la vetero aparte bonaŭguris. Inter dekduo da aliaj lingvoj, esperanto prezentiĝis al dimanĉaj promenantoj per elektitaj libroj, revuoj el la tuta mondo, kaj muzikaj KDoj kaj kasedoj. Al vizitantoj, oni aŭdigis la kantojn kaj vidigis sur portebla ekrano la unuan lecionon de la Mazi-kurso. Ĉe kradoj pendis ekspozici-paneloj (pruntitaj de Unuiĝo Franca por Esperanto), montrantaj la uzojn de esperanto tra la mondo. La interesiĝo de la publiko, pli granda ol dum antaŭaj manifestacioj, kongruis kun la taŭga organizo kaj la kvalito de la prezento. La literaturaj (ĉefe Tinĉjo kaj Asterikso) kaj, eĉ pli, la muzikaj produktaĵoj mirigis la publikon; vendiĝis kelkaj kompaktaj diskoj el la ĵus eldonita *Vinilkosmo-kompil'*, kaj dekoj da lernolibroj kaj vortaretoj. Kvar personoj aliĝis al la senpaga inicia kurso por dimanĉo, la 11a de junio. La deĵorantoj seninterrompe diskutis kun la publiko kaj invitis al aŭskultado de prelegdebato okazonta samloke, sur ĵus starigita podio, je la 14a horo.

"Kiel konservi la kulturan kaj lingvan diversecon en la Eŭropa Unio?" estis la temo traktita de Mikael Cwik, ekonomiisto ĉe Eŭropa Komisiono en Bruselo kaj esperantisto de 12 jaroj.



Li unue atentigis, ke lingvo minoritata en sia ŝtato estas nepre majoritata en sia regiono aŭ sia vilaĝo; tial la streboj al konservado kaj rajtigo de lingvoj devas apogiĝi sur la plej granda politika unuo, kie la lingvo estas majoritata. Tio estas konforma al la subsidiara principo de la eŭropa konstitucio.

Mikael Cwik priskribis poste la paradoksan situacion de Eŭropo, kiu ja fieras pri sia lingva kaj kultura diverseco, sed ne scias kiel protekti sin kontraŭ la edukistemoj, kiuj, pro efikec-strebado, koncentriĝas al lernado de la angla kiel unua fremdlingvo.

Por eliri el la dilemo: komuna lingvo por komuniki aŭ konservado de diverseco, Mikael Cwik proponas enkonduki en la eŭropajn edukajn sistemojn planlingvon - kia esperanto -, kiu servu samtempe kiel propedeŭtiko al lernado de naciaj aŭ regionaj lingvoj, kaj kiel neŭtrala komunikilo interŝtata, tiel liberigante la lernantojn de la deviga angla lingvo, kaj ebligante vastan elektelecon inter la diversaj eŭropaj kulturoj kaj lingvoj, kies egaleco fariĝos tiam ne plu teoria.

La unua parto de la prelego tikle tuŝis la aktualan lukton de la tuluzaj okcitanistoj; tial la debaton prezidis Guiu Senges, prezidanto de Institut d'Estudis Occitans en

Auta Garona. Ekestis interesa interŝanĝo, laŭ kiu evidentiĝis, ke la situacio en Francio ne similas tiun de aliaj minoritataj lingvoj: ne plu ekzistas homoj, kies nura gepatra lingvo estas la okcitana.

La dua parto de la prelego ankaŭ estigis demandojn kaj argumentadon far la publiko, kiu iom post iom aliris la subĉielajn sidlokojn, allogita de la prelegvortoj aŭdeblaj sur la tuta placo. La debato tiel finiĝis antaŭ pli nombra publiko ol komenciĝis la prelego.

Post la oficiala "pinta debato" inter la okcitanisto Fèlix Castan kaj la pariza erudiciulo Henri Meschonnic, kiun sekvis kun intereso ankaŭ esperantistoj - kaj inter ili Mikael Cwik -, prelegintoj kaj organizantoj finis la vesperon ĉirkaŭ amikeca glaso.

Entute do tre kuraĝiga festo:

espereble maturiĝos la fruktoj de tia promesplena tago.

E.K.C

Pri esperanto en kvar tuluzaĵ radiostacioj

Esperanto-programoj ekzistas en Tuluzo de 1988 en Radio FMR. Ĝin sukcesis pluvivigi Floreal Martorell, Rikardo Cash kaj aliaj membroj de Eurokka kaj Esperanto-Kultur-Centro. La aktivado de la Tuluza Esperanto-Redakcio ampleksiĝis kaj ebligis malfermi du novajn esperanto-programojn en du pliaj radio-stacioj de la urbo, kies aŭskultantaroj estas tute malsamaj. Tiuj novaj esperanto-programoj similas sur la tri radiostacioj kaj nomiĝas Esperanto-magazino de Tuluzo. Ili disaŭdiĝas laŭ jenaj horaroj kaj frekvencoj:

- Ĉiulunde de la 20a ĝis la 21a ĉe Radio Canal Sud: 92,2 MHz
- Ĉiuĵaŭde de la 19a ĝis la 20a ĉe Radio Occitania: 98,3 MHz
- Ĉiuĵaŭde de la 19a ĝis la 20a ĉe Radio FMR: 89,1 MHz (redisaŭdigo de la elsendo farita lunde en Canal Sud). La programo de Radio FMR disaŭdiĝas ankaŭ samtage kaj samhore ĉe Radio d'Oc: 88,5 en Moissac kaj 94,2 en Montalban.

emt

Por noĥĉoj

Internacia Komitato de Etnaj Liberecoj (IKEL) sendis leteron al Boris Jelcin, prezidento de la Rusia Federacio. Jen ĝia elrusigo. IKEL preferas la terminon noĥĉo, kiu malbavas la imperisman kromguston de la internacia ĉeĉeno; la unua devenas el la nomo, kiun tiu popolo uzadas por si mem, dum la duan eltiris rusoj el tiulanda vilaĝo.

Estimata Prezidento,

IKEL, Internacia Komitato por Etnaj Liberecoj, organizaĵo defendanta la rajtojn de malplimultoj kaj de la minacataj popoloj, sekvas kun granda zorgo la eventojn en la Noĥĉa Respubliko.

Ni neniel komprenas la agreson kontraŭ Noĥĉio kaj la amasmortigadon de ties loĝantaro. Senkonsidere de nia juĝo pri la homoj, kiuj deklaris la sendependecon de la Noĥĉa Respubliko, ŝajnas al ni, ke tiu deklaro absolute ne devojiĝas de la principoj akceptitaj far la Rusia Federacio kaj ties Prezidento kiam sendependiĝis Estonio, Latvio kaj Litovio. Ni

ankaŭ petas Vian atenton pri tio, ke la noĥĉoj fariĝis subuloj de la rusa caro maljam en la duono de la 19a jarcento, kiam Ĉebaltio delonge estis parto de la imperio.

Mi ankaŭ volas firme substreki, ke neniuj politika konsidero povas pravigi mortigon de homoj, kiujn Vi, cetere, konsideras Viaj civitanoj.

Tial ni urĝe petas Vin ordoni tujan retiriĝon de la rusia armeo el la noĥĉa teritorio, kio ŝajnas al ni esti neforlasebla antaŭkondiĉo por la komenco de pacintertraktadoj por la repaciĝo inter la Rusia Federacio kaj la noĥĉa popolo.

Altestime,

Daniele Vitali, vicprezidanto de IKEL

Por ke esperanto restu viva!

László Szilvási

Ĉu la lingvo esperanto kaj la esperanto-movado ankoraŭ ekzistas? Kaj se jes, ankoraŭ kiom longe? - Eldonantoj de libroj, kasedoj ktp. ĉiutage frontas la problemon de aĉetantoj (averaĝa eldonkvanto de libroj: 500 ekzempleroj. Krome, antaŭe ekz. en Hungario en unu jaro oni eldonis 36 esperanto-librojn, nun 1), organizantoj de aranĝoj nur revas pri amasa partopreno (antaŭ dekelkjaraj ekz. IJK-jn partoprenis ĉ. 1000 gejunuloj, nun 200), kaj esperantistoj-aplikantoj amare renkontas la kreskantajn problemojn kaj prezojn (memoru pri la "ĉielaj" prezoj de IJK-95).

Ĉio ĉi povus esti nur subjektiva pritakso, se ni ne rigardus la konkretajn ciferojn. En la apudaj bildo kaj tabelo estas montrata la kvanto de UEA-membroj en la lastaj jaroj (fonto: UEA).

Ne kulpas la soclandanoj!

Ofte oni aludis, ke la malkreskon de membroj kaŭzis la orient-eŭropaj ŝanĝoj, sed tio ne estas vera, almenaŭ ne tiel globale. La ŝanĝoj en orienta Eŭropo komenciĝis en novembro-decembro de 1989, do efiko de tiuj aferoj povas esti respegulata en la UEA-statistiko plej frue en la datumoj de 1992.

La falon post 1987 ĝis 1992 do kaŭzis ne tiu fenomeno, sed tute aliaj faktoroj. Evidentas, ke esperantistoj atendis "ion", ian elstaran sukceson de la jubilea jaro


por la disvastiĝo de esperanto. Tio ne okazis, eĉ paralele la mondo eksplode internaciigas, tankiras antaŭen la angla, kaj multaj niaj iamaj homoj jaron post jaro senluziigas, ekziĝas.

Paralelaj tendencoj

Evidente la esperanto-komunumo konsistas ne nur el UEA-membroj. Sed ni devas konscii, ke ĝi estas la plej granda, kaj ĝenerale respegulas la staton de Esperantujo. Se ĝenerale en monda dimensio kreskas la nombro de esperantistoj, kreskas ankaŭ la nombro de UEA, kaj ankaŭ inverse. Kompreneble en iuj landoj povas ekzisti kontraŭaj tendencoj pro aktiva, altnivela laboro de iu kolektivo, pro lokaj cirkonstancoj ktp., sed en monda dimensio la UEA-statistikaĵo tamen estas korelativa (samtendenca) al la ĝenerala bildo.

Kritika (kriza) maso

La malaltiĝo de membronombro (aŭ ĝenerale la nombro de esperantistoj, servo-uzantoj) en si mem ne estas granda problemo, ĝis tiu malkresko atingas iun kritikan (krizan) nivelon: se la nombro de servo-uzantoj tro malkreskas, malmultiĝas kaj plikostiĝas la esperanto-servoj (perdas la allogan karakteron), kio kaŭzas plian neuzon de tiuj servoj kaj plian ekziĝon, kio denove kaŭzas la malaperon de esperanto-servoj, aplikobloj...



Linio: Individualaj membroj, Kolumnoj: suma kvanto

Tiu diabla spiralo estas mortdanĝera al ĉiu firmao kaj same al nia esperanto-movado! Esploru la sekvan tabelon (kompilita laŭ la revuo *Esperanto* en la redakcio de *Ruslanda Esperantisto*):

	1983	1992	1993
Nombro da libroj	219	205	136
Sumo de paĝoj	33 139	25 789	18 511
Tradukitaj beletraĵoj	42	32	28
Averaĝa paĝkvanto	151	126	136
Averaĝa prezo	15,2	15,9	20,1

La konkludon faru vi mem.

Strategio necesas!

Tiuj fenomenoj estas videblaj ne nur nun. Kiam ni startigis la gazeton *Eventoj* en 1992, ni jam vidis ĝin kaj la temo strategio daŭre ricevis primaran prioritaton (vidu la (fi-?)faman artikolon de J. Werdin en 1992, la artikolojn postulantajn "laborajn kaj strategiajn kongresojn" en Vieno, Valencio ktp). Ni klopodis atentigi la komitatanojn kaj estraron de

“Se la nombro de servo-uzantoj tro malkreskas,
malmultiĝas kaj plikostiĝas la esperanto-servoj, kio
kaŭzas plian neuzon de tiuj servoj kaj plian ekŝigon, kio
denove kaŭzas la malaperon de esperanto-servoj,
aplikebloj”

UEA, sed nia voĉo estas tre mallaŭta (kaj mi estas nek A- nek B-komitatano de UEA).

Haltigu la spiralon!

Por perspektiva ekzisto de nia komunumo ni devas haltigi la falon de organizitaj membroj! Ni devas analizi la kaŭzojn, la motivojn kaj devas pripensi la sekvindan vojon. Tiu proceso de ellaboro kaj plenumo nomiĝas strategio.

Ekzistas aliaj, same neprofitcelaj organizoj, kiuj estas sukcesaj. Memoru pri la feminisma, verdula, vegetaranisma movadoj. Ni devas atenti pri iliaj manieroj, kaj apliki la utilajn elementojn.

Ne ploru! - Agul

Por haltigi kaj returni la nunajn tendencojn plej unue ni devas zorgi pri niaj jamaj membroj. La plej unua paŝo devas esti la zorgo pri la baza informfluo, kaj solvo de la eduka parto de la lingvo-instruado.

Se la informfluo ne estas solvita, la informoj pri aranĝoj, libroj,

eldonaĵoj, servoj ne atingas la potencialan uzanton. Kaj inverse, la renkonto de diversaj servoj generas la deziron kaj aliajn.

Pionira paŝo en Hungario

Dum la ĉi-jara Ronda Tablo de hungariaj esperanto-organizoj (estas ĉ. 20), la ĉeestantoj post longa preparo fine akceptis la sekvajn strategiajn decidojn:

“Partoprenantoj de la Ronda Tablo konsentas pri tio, ke, se oni volas restigi viva kaj disvastigi la esperanto-movadon, estas fundamente necese ligi la lingvolernantojn al la esperanto-komunumo kaj movado. Por tiu celo

1. La subskribantaj organizoj faras nur tiajn lingvo-instruadojn, esperanto-kursojn, kie krom la lingvaj elementoj ankaŭ la instruado de

—la bazo de la esperanta kulturo,

—movada strukturo,

—enmovadaj servoj kaj ilia konkreta uzmaniero

estas konsiderataj kiel integra parto de la instrua proceso.

2. La subskribantaj organizoj konsideras fundamenta postulo, ke la instruisto (kursgvidanto) ankoraŭ antaŭ la fino de la kurso instigu ĉiujn lernantojn al abono de iu internacia esperanta gazeto, certiganta la bazan informfluan.

3. La subskribantaj organizoj akceptas kiel celo, ke ĉiu ilia membro abonu iun internacian esperantan gazeton, certigantan la bazan informfluan.”

Estas certe, ke tiuj paŝoj ne sufiĉas por haltigi la tendencon, sed ili estas la unuaj paŝoj. Pri pliaj paŝoj por plibonigi servojn, en praktiko utiligi la lingvon, faka aplikado ktp. serioze oni povas pensi nur post la plenumo de tiuj unuaj, nepre necesaj paŝoj.

Kiu sekvos?

Evidente la problemo ne estas nur hungaria. Dependas de la konscienco de estraranoj, aktivuloj de ĉiuj esperanto-societoj, kiel daŭriĝas nia vojo. La suprajn decidojn ni proponas al la atento de ĉiuj konsciaj esperanto-organizoj. Kaj fine mi esperas, ke la temitajn “internaciajn esperanto-gazetojn” - kaj ne nur *Eventoj* - oni volonte kaj kun utilo legos, eĉ sen pornografiaj temoj.

El *Eventoj* n-ro 79, junio 1995

La Setmana

SETMANARI OCCITÀ D'INFORMACIONS

VISTEDIT-La Setmana - B.P. 86 - F64230 LESCAR - Occitània - Tel. (+33) 59 68 66 79 - Fax (+33) 59 68 67 17
Joan-Ferriol Masip i Bonet - Carrer de la Font Florida, 86 1r.1a. - 08004 BARCELONA - Tel. i Fax (93) 332 45 25

"Poemo de Utnoa" tra malrespektemaj okuloj

Mi plene konscias, ke amatora recenzo de la libro de nia estimata Abel Montagut nun, kiām jam multaj kompetentuloj en Esperantio unuanime asertis, ke ĝi estas majstra verko de nia literaturo, kaj preskaŭ ĉiuj scias pri ĝia enhavo, estas stultaĵo; sed ĉar mi ne estas literatura fakulo, lasu min skribi kelkajn liniojn pri ĝi el la vid-punkto de tute senranga, simpla leganto. Eble tio ja estas nova.

Unue mi tute ne emis legi la Utnoan epopeon. Poezio ne estas mia ŝtata ĉevaleto kaj la vido de pli ol 200-paĝa, grandformata libro kun la klara nomo de "poemo" certe ne allogis min, eĉ puŝis min malantaŭen. Fakte, estis nur promeso al la aŭtoro (interŝanĝe de kelkaj salutvortoj kaj persona subskribo en ekzemplero de lia verko), kio devigis min legi la libron. Sed mi tuj iĝis ravita.

Kaj kial ravita? Certe ne pro la aventurriĉa navigado de Utnoa en lia arkeo tra la Diluvo! Dum 7095 versoj eĉ ne unu guto da diluveca pluvo falas! Tiurilate, la kovrilo de la libro estas vere trompiga, ĉu ne?

Ĉu ravita eble pro la versfaraĵo? Ankaŭ ne. Kiel dirite, mi estas simplanima leganto, kiu ŝatas nur

rimitan poezion, kaj tiu de *Poemo de Utnoa* ne estas tia. Sed bonŝance ĝiaj specialaj versoj (grava elpenŝaĵo de nia kara Abel) estas tiom longaj ("aleksandridoj" ilin nomas la fakuloj), ke maldiligentaj legantoj kiel mi ne konscias, ke ili legas fakte poemon, kaj ne ian strangaspektan aŭ fuŝe kompostitan prozon.

Finfine, kio ravis min? Nu, la atmosfero de la rakonto. Atmosfero genie kreita de la aŭtoro per elegantaj (tamen ne tro malfacilaj) vortoj; per realeca priskribo de moroj, lokoj; per buntaj situacioj; per selekto de tutmondaj epizodoj klasikaj profunde kaj ofte senkonscie enradikiĝintaj en niaj cerboj; kaj per la, mi ne diru "imitado", sed "rekreado", de la stilo de antikvaj epopeoj.

Tiu atmosfero kreas tian impreson de realo nur kompareblan al verkoj de veraj majstroj literaturaj (kaj mi pensas ekzemple pri *La nomo de la rozo* de Umberto Eco).

Krom tiu ĝenerala eco de la verko, laŭ mi la plej grava, ankaŭ kelkaj konkretaj partoj de la rakonto estas rekomendindaj per si mem, kaj inter ili mi mencias nur la magian promenadon de Utnoa tra la galerio de tutmondaj abomenuloj estontaj.

Neniam antaŭe plenumado de farita promeso estis por mi tiom ĝojiga.

Pedro M. Martín

- Abel Montagut, *Poemo de Utnoa*, Pro Esperanto, Vieno, 1993, 223 p.

Katalunaj loknomoj en esperanto

Hektor Alos jam plendis en ĉi tiu bulteno pri la esperantigo de loknomoj farita de SAT en sia lasta adresaro. Li ŝajne bezonis tutan jaron por detale respondi kaj tion li faris per faka broŝuro, kie li klarigas, kiujn kriteriojn oni devus uzi, laŭ li, se oni dezirus esperantigi loknomojn el la kataluna lingvo. Kvankam la aŭtoro kontraŭas amasan enkondukon en esperanton de loknomoj, li komparas la fonetikon de la kataluna kaj esperanto, analizas kiel esperanto asimilis vortojn kaj ĉefe loknomojn el la franca kaj aliaj lingvoj, kaj el tio provas eltiri konkludojn.

Interesitoj povas mendi la libron ĉe nia libroservo.

- Hektor Alos i Font, *Propoj por la esperantigo de katalunaj loknomoj*, La aŭtoro, Barcelono, majo 1995, 33 p, 21 cm, 500 p-toj.

**Felipĉjo, pacigu rapide
la balkanojn kaj revenu tuj**

Quim Monzó en esperanto

La revista literària en esperanto *Fonto*, editada al Brasil, ha publicat una traducció del conte curt *Quarts d'una*, que forma part del llibre *El perquè de tot plegat* de Quim Monzó. La traducció inclou una petita semblança de l'autor.

Diccionari etimològic de l'esperanto

L'estudiós suec Ebbe Vilborg ha publicat el tercer volum (K_M) del *Etimologia vortaro de esperanto* (diccionari etimològic de l'esperanto). L'obra indica les paraules en els idiomes en les que es basa la de l'esperanto, els mots de la mateixa família en altres llengües planificades (ido, interlingue i interlingua) i la història de les paraules originàries.

El francès André Cherpillod va publicar fa uns anys una curiosa obra

de la mateixa branca: *Mil ekzotaj vortoj* (mil mots exòtics), on explica la curiosa etimologia de 1000 paraules d'origen no indeuropeu, com *huragano* (huracà) o *tabako* (tabac).

Collecció de traduccions a l'aragonès

L'editorial Gara d'Edicions ha endegat una nova fita per a la llengua aragonesa: dues noves col·leccions d'obres traduïdes a aquesta llengua minoritzada, parlada per unes 30.000 persones a les valls pirenenques d'Aragó. Com diu l'editorial, "*Gara d'Edicions aima d'amarar clasicos mudernos, y no tan clasicos, a os lectors en luenga aragonesa*". Dins la collecció *Libros de Pocha* han aparegut ja *O Prenzipet* d'Antoine de Saint-Exupéry, *A Metamorfosis* de Franz Kafka, *Suenios d'un seductor* de Woody Allen i *Alizia en o País de as Marabiellas* de Lewis Carroll.

La collecció *Finestra Batalera* presenta *Chil*, o *Torrero de Ham* de J.R.R. Tolkien i anuncia també *O Hobbit*. Es tracta d'obres de format petit en traduccions fresques i acuradíssimes. Malhauradament no sabem de cap llibreria del nostre país on es puguin trobar.

Traduccions de la Bíblia

□ ASSOCIATED PRESS/
ELNA UPDATE

La Bíblia ha estat traduïda _almenys parcialment_ a 2.062 llengües, segons les Societats Bíbliques Unides. 44 d'aquestes traduccions van ser publicades per primera vegada el 1993. Una traducció completa de la Bíblia pot trobar-se en 337 de les 6.000 llengües que, segons estimacions, hi ha al món.

Quasi ressurrecció de llengües a Califòrnia

□ ELNA UPDATE

Gràcies a l'èxit assolit a les illes Hawaii, la Xarxa Nativa Californiana s'ha

embarcat en un programa ambiciós per salvar algunes de les llengües natives d'aquell estat americà. Com que la majoria dels parlants actuals sobrepassen l'edat de jubilació, no es pot seguir el model hawaïà d'establir un ensenyament des de la preescolar. El programa californià es basa en ensenyar a joves adults, que passaran la llengua a la nova generació. Una vintena de grups ensenyen actualment intensivament diverses llengües indígenes. Leanne Hinton, professora de lingüística a la universitat de Berkeley subratlla que aquest projecte és de molt abast que el de Hawaii a causa del nombre de llengües: unes 50 llengües indígenes sobreviuen al Califòrnia, mentre que només una ho ha aconseguit a Hawaii. Això obliga a racionalitzar recursos financers i humans, que condemnen alguns idiomes a mort.

Aquest any, el Congrés Català d'Esperanto, no és tan sols per als esperantistes

Aquest octubre a Mataró hi trobaràs un cicle de cinema, un curs accelerat d'esperanto, concerts, tallers, xerrades sobre llengües, problemes socials...

27è Congrés Català d'Esperanto
DE LA COMPRENSIÓ A LA TOLERÀNCIA
DE LA DIVERSITAT CULTURAL AL MESTISSATGE
Mataró, del 12 al 15 d'Octubre 1995